



Impresoj pri la Itala Kongreso, p. 6–7



BET-52, p. 4–5

- ♦ Somera kurso en Iisalmi 14.–17.7.2016, p. 10–11
 - ♦ La 49-a konferenco de ILEI, p. 14–15
- ♦ Kansainvälistä oppilasvaihtoa Kaarinassa 50 vuotta sitten, s. 19

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300

Kansi/Pärm/Kovrile: Papo Francisko, Foto: *Sakari Kauppinen*

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com

Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Börje Eriksson, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ bovoeo73@gmail.com

Andrei Dumitrescu, ☎ 040 411 6579 ✉ dumiac@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Zamenhof kaj la Finnlanda konstitucio



”Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.” – Tiel difinis Ludoviko Zamenhof la devon de la ŝtato en sia lasta verkaĵo ”POST LA GRANDA MILITO – Alvoko al la diplomatoj” en la komenca 1915, dum daŭris la unua Eŭropa interbuĉado atinginta industrian skalon, tial en postaj jardekoj nomita la unua mondmilito. Zamenhof eble tiam ankoraŭ kredis je iom baldaŭa militfino. Sed ĝi ne finiĝis antaŭ lia forpaso en aprilo 1917.

”Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj”, diris Zamenhof tiam, antaŭ pli ol cent jaroj. Tiu ideo ne estis nova, ĝin ne elpensis, sed alproprigis doktoro Esperanto. En la 1800-aj jaroj Eŭropo estis kontinento de monarĥioj kaj imperioj, ankaŭ transmaren. La ŝtatoj de tiu epoko konsideris siajn enloĝantojn ne kiel homojn, sed kiel materialon. Postulo de egalrajteco kaj demokratio kreskis en tia subprema medio. Zamenhof klare vidis, ke bona volo ne sufiĉas por bono; necesas justaj rilatoj kaj taŭgaj iloj.

Ankaŭ la ideo de komuna neŭtrala lingvo ne estis nur lia; male, en la 19-a jarcento tiu ideo estis iom moda, kvankam eĉ tiam ne nova. Kial lia projekto sukcesis, ekflugis, dum ekzemple *Volapük* de *J.M. Schleyer* transvivis nur la unuan entuziasmon? Iel tion ilustras la originoj de la projektoj kaj iliaj nomoj. Schleyer nomis sian lingvon ”Volapük” (tio signifas ”mondo-lingvo”) kaj rezervis al si la rajton aprobi ĉiun novan vorton, dum la projekto eldonita sub pseŭdonimo kaj donita al la mondo kun la espero ke ĝi ekvivu por bono de homoj fariĝis vivanta lingvo nomata laŭ D-ro Esperanto. Tia

nomo difinis, kiel foje diris Zamenhof, ke ”mi ne volas esti kreinto de l’ lingvo, mi volas nur esti iniciatoro”. Tiel Esperanto fariĝis lingvo kreanta sian pluan ekzistadon.

Zamenhof vivis en epoko, kiam forte evoluis ideoj de nacia ŝtato kaj patriotaj movadoj. Sian rilaton al tio li difinis jene: ”Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la interesoj de unu gento aŭ la malamon al alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo.”

Lingvo, interpopolaj (-gentaj) kaj interreligiaj rilatoj neŭtrale homaj estis ideoj adoptitaj de Zamenhof. Li revis pri estonta mondo, kie tiaj rilatoj estos realigitaj.

Luj ideoj prezentitaj de Zamenhof en sia *Alvoko* kaj en sia homaranisma pensado realiĝis, sed ne facile, ne ĉiuj kaj ne ĉie. Ni en Finnlando (kiu laŭ Zamenhofsia ideo estus prefere nomata sennaciece ekzemple Helsinklando) atingis multon. Nia konstitucio enhavas la principon, ke ”regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas”, por uzi Zamenhofan esprimon. Lernodevo koncernas ĉiujn infanojn enlandajn, kaj, plej grave, la publikan regadon, kiu neniun rajtigas restigi ekstere. Libereco de religia konfeso kaj praktiko estas garantiita.

Ni esperantistoj postulu de ni mem kaj nia ŝtato sekvi la proprajn principojn.

Tuomo Grundström

BET-52

Certaj eminentuloj havis grandajn revojn. *Martin Luther King* kaj *Nelson Mandela* revis pri la egaleco de nigrahaŭtaj homoj. La pola okulkuracisto *Ludwik Zamenhof* revis pri la egaleco de la tuta homaro. Tial li inventis kaj evoluigis la internacian lingvon Esperanto. Li kredis kaj esperis, ke la komuna lingvo helpos popolojn kompreni unu la alian kaj eviti militojn. Internacia lingvo ĝuste nun estas ege bezonata, ĉar militoj daŭras en la mondo, kaj popoloj fariĝas malamikaj inter si. Laboro pro paco estas nepra kaj Esperanto estas valora rimedo en la aspiro al paco kaj kunkompreno.

Feliĉe ĉiujare okazas kunvenoj, kie renkontiĝas sin homoj de multaj landoj, parolas la komunan lingvon, Esperanton, kaj pace interrilatas sendepende de kia lando ili alvenas. Krom la tutmonda Universala Kongreso unu el la gravaj renkontoj estas la Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiujn laŭvice aranĝas tri baltiaj ŝtatoj: Litovio, Latvio kaj Estonio. Ĉi-jare okazis la 52-aj Baltiaj Tagoj en *Birŝtonas*, Litovio, dum la tempo de la dua ĝis la deka de julio.

La Tagoj havis altan protektanton, la ĉefministron de Litovio, *Algirdas Butkevičius*.

Birŝtonas estas naturbela urbeto facile atingebla aŭtobuse ekzemple de Vilno aŭ *Kaunas*. La rivero *Nemunas* trafluas la urbeton kaj vivigas la pejzaĝon. Finnoj konas la riveron per la nomo *Niemen*, por germanoj ĝi estas *Memel*. La urbeto estas konata pro multegaj famaj banejoj, kie oni povas ricevi flegojn por diversaj malsanoj. Oni trinkas la sanigan akvon, ricevas banojn kaj aliajn sanigajn flegojn. Indas viziti la urbeton kaj flegi sian sanon en la banejoj.

Birŝtonas montriĝis tre konvena loko por aranĝi la Tagojn. Ĉiuj unuopaj preleg-kaj koncertlokoj estis facile atingeblaj piede. Tamen por eksterlandanoj, kiuj ne parolis la litovan lingvon, estis bona, se oni havis desegnitajn skemon aŭ mapeton markitajn je la plej gravaj lokoj. Ekzemple dum la tago de la solena

inaŭguro kelkaj unuopaj esperantistoj aŭ grupoj vagadis surstrate serĉante la Kulturdomon. Ĝenerale la Tagoj estis bonege kaj suverene organizataj sub la gvido de *Povilas Jegorovas*, advokato, prezidanto de Litova Esperantoasocio, mondfama esperantisto. Lin helpis multnombra teamo por la akcepto kaj enloĝado de la partoprenantoj en la sanatorio *Versmė*.

La Tagojn partoprenis pli ol tricent esperantistoj. Alvenis ne nur litovoj kaj aliaj baltianoj, sed multaj alilandanoj. La listo de landoj estas longa, kaj multaj homoj, venantaj el foraj landoj, faris longan vojaĝon por partopreni. La listo de la eksterlandoj estas jena: Alĝerio, Belorusio, Belgio, Britio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Ganao, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Nederlando, Pakistano, Pollando, Serbio, Skotlando, Slovakio, Slovenio, Sud-Afriko, Sud-Koreio, Svislando, Togo, Ukrainio. Ege ĝojiga afero estis la multnombra partopreno de junaj esperantistoj.

La programo de la Tagoj estis vasta kaj valora. Okazis lingva instruado, multaj prelegoj, koncertoj, ekskursoj, ktp. Temis nur pri elekto, ĉion ne eblis ĝui. Tiel granda estis la ofertata materialo. La Tagoj multe similas al la Unversalaj Kongresoj, nur en malpligranda amplekso. La prelegoj de profesoro *Ilona Koutny* estis interesaj kaj altnivelaj kiel kutime. Ŝi prelegis inter alie pri la temo: Esperanto en interkultura komunikado. Ŝi ja estas kvazaŭ emblema personifikado de Esperanto. Ŝi prelegas klarvoĉe, flue kaj mitrale rapide. Simile oni povas taksii la alian profesoron, la rusan esperantiston *Aleksander Melnikov*. *Dmitri Shevchenko* kaj nia amata "koboldino" *Anna Striganova* prelegis pri iliaj propraj temoj. Okazis aliaj sciencaj kaj lingvaj prelegoj.

La plej altnivela kaj neforgesebla kultur-evento estis la pianokonzerto en *Kurhauzo*. La pianisto, varsovia muzika profesoro *Jerzy Dobrzyński* el la Varsovia Muzika Universitato ludis la muzikon de *Frederik Chopin*. Kvazaŭ

en alia kategorio okazis multaj pluaj koncertoj, ege ŝtataj de la publiko: Asorti, JoMo, Mikaelo, Ĵomart kaj Nataŝa ktp; spektaklo, riverŝipa ekskurso, ktp, ktp.

La vetero ne tre favoris. Ĝi estis plejparte pluva kaj malvarma. Malgraŭ tio la etoso es-

tis varma kaj gaja. Oni vigle diskutadis kun malnovaj kaj novaj amikoj aŭ konatoj. La semajno tro rapide forflugis. Restis nur agrablaj memoroj.

Bruno Lehtinen

Aŭtunaj Tagoj en Taivalkoski – Syyspäivät Taivalkoskella 24.–25.9.2016

Kiam tiu ĉi gazeto atingas la legantojn, la karavano al Aŭtunaj Tagoj estas preskaŭ survoje. La duono de la partoprenontoj veturas per la komuna aŭtobuso el Turku kaj Tampere kaj aliaj kaptos ĝin en Oulu. Kelkaj el la ĉ. tridek kunestantoj venos al la feria hotelo *Saija* per propra transportilo.

La Aŭtunaj Tagoj estos ankaŭ internaciaj danke al niaj eksterlandaj partoprenontoj. Inter ili estos Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko el Moskvo, kiuj ankaŭ turneas en Finnlando antaŭ kaj post la AT (kiel informita en retlistoj).

Nin atendos interesa semajnfino kun multflanka programo kaj amuza kunestado. En la sekva Esperanta Finnlando vi vidos bildojn kaj povos legi spertojn de la Tagoj.

Kun saat tämän lehden, yhteinen bussikaravaanimme Taivalkoski syyspäiville on starttivalmiina. Noin puolet osallistujista matkustaa siinä Turusta tai Tampereelta ja lisää matkustajia otamme Oulusta. Muutama noin kolmestakymmenestä syyspäiväläisestä tulee suoraan lomahotelli Saijaan lauantaina.

Meitä odottaa mukavan yhdessäolon merkeissä monipuolinen ja mielenkiintoinen viikonloppu. Saamme paljon tietoa elämästä ja tapahtumista Taivalkoskelta ja nautimme toisestemme seurasta. Päivät ovat myös kansainväliset, sillä ulkomaisia osallistujia on niin idästä, lännestä kuin merten takaa. Seuraavassa lehdessä voit tutustua päivien tapahtumiin kuvin ja sanoin.

Salutas la AT-teamo,
terveisin syyspäivien järjestelijät



Infankantoj

Aperis serio da infankantoj kun ĉarmaj animacioj.

Ĝuu:

[youtube.com/watch?v=gh9w7QpyQtY](https://www.youtube.com/watch?v=gh9w7QpyQtY)

Sakari Kauppinen

Foto: Youtube

Impresoj pri la Itala Kongreso

En Frascati, apud Romo, okazis la 83-a itala kongreso de Esperanto 20.–27.8. Partoprenis ĝin ducento da esperantistoj, ĉefe kompreneble el Italio, sed kun partoprenantoj el 29 landoj, inter ili kvin finnoj.

La italaj kongresoj estas kvazaŭ Universala Kongreso en miniaturo. Ankaŭ ĉi-foje estis bunta kultura kaj eduka programo. La temo de la kongreso estis instruado de lingvoj en Eŭropo. Seminarion pri tio gvidis *Kristin Tytgat*. Vere estis interesa kaj instrua seminario, kvankam mi ne povis partopreni ĉiujn sesiojn. Okazis ankaŭ alia seminario pri didaktikaj helpiloj por instruado kaj lernado de Esperanto, gvidita de *Katalin Kováts*, utila por ĉiuj kiuj instruas Esperanton.

Inter multaj prelegoj mi menciui nur tiun kiu pritraktis la temon, ĉu Esperanto estu konsiderata kiel minoritata lingvo. Kreiĝis eĉ eta disputo, ĉar estis invititaj kelkaj italaj lingvistoj, pro kio la sesio estis dulingva. Iuj italaj esperantistoj volis malpermesi, ke tia renkonto okazu.

En Romo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj kompreneble ne mankis celoj por ekskursoj. Inter ili estis ankaŭ akcepto de la papo. Elektante tiun ekskurson mi tute ne sciis, kia ĝi estos. Evidentiĝis ke la homoj kolektiĝas sur la Sanktpetra placo, la papo ĉirkauveturos ĝin en sia aŭtomobilo kaj poste parolos al la pilgrimantoj. Estis amaso da homoj. Ni devis alveni frue por ricevi bonajn lokojn, kion ni ankaŭ sukcesis fari. Por kelkaj gravis vidi la papon, por aliaj eble pli gravis videbli mem, tiom aktive oni flirtigis la Esperantan flagon.

La papa parolo estis ŝanĝita, ĉar mortis multaj homoj pro tertremo en centra parto de Italio. La antaŭan nokton eĉ ni estis vekitaj de la skuoj. Feliĉe ili ne malhelpis nian kongreson, sed la tuta Italio nature ploris pro la homaj kaj materiaj perdoj. La suno brilis kaj ni spertis italan varmon en la placo. Poste en Vatikanaj muzeoj ni spertis pli da varmo kaj nekredoblan homamason.



Alia ekskurso kondukis nin al vilaĝoj (fakte palaĉoj), kiujn pretendantoj al papo konstruigis en la 16-a jarcento. Unua tia kastelo, *Villa Falconieri*, antaŭ nelonge estis donita al *Akademio Vivarium Novum*, kies celo estas revivigi la antikvajn latinan kaj grekan lingvojn. Tie eĉ la ĉiĉeronado okazis en tiuj lingvoj. La lernantoj volonte nin akceptis, ĉar estis okazo montri, kiel bone tiuj lingvoj funkcias eĉ hodiaŭ. Unu ekskurso kondukis nin al *Villa d'Este* en *Tivoli*, kiu havas unu el la plej famaj parkoj en la tuta mondo.

Estis bone aranĝita kongreso kaj okazo konatiĝi kun italaj esperantistoj. Certe ankaŭ en la estonteco ĝi estos bona alternativo al tiuj kiuj preferas pli intimajn renkontiĝojn anstataŭ amaskongresoj.

Venontjare ĝi okazos en la plandumo de Italio, en Herakleo. En mapoj vi apenaŭ trovos tian nomon, ĉar temas pri antikva nomo de tiu loko. En nuntempaj mapoj ĝi nomiĝas *Policoro*.

Sakari Kauppinen



Fotoj: <https://esperantohelsinki.wordpress.com/2016/08/28/impresoj-pri-la-itala-kongreso/>

Novaj Honoraj Membroj de UEA

Vilmos Benczik (Hungario) naskiĝis en 1945. Profesie li estis profesoro en altlerneja fakultato de la universitato ELTE en Budapeŝto. Li lernis E-on en 1959, aliĝis al UEA en 1966 kaj iĝis dumviva membro en 1977. Li estis komitatano de TEJO 1964–1968 kaj estrarano de Hungara E-Asocio 1965–1967 kaj 1978–1992. Li redaktis la revuon Hungara Vivo 1977–1982 kaj de 1976 ĝis 1990 gvidis la eldonejon de HEA, ĉe kiu aperis 138 libroj en/pri E-o en la suma kvanto de 368 mil ekz. Li estis LKK-ano de la 68-a UK en Budapeŝto en 1983, komitatano de UEA 1980–1986 kaj prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1986–2002. Li verkis recenzojn por multaj revuoj, parte kolektitajn en *Studoj pri la Esperanta literaturo* (1980), kaj abunde artikolis kaj tradukis. Li redaktis i.a. *Libro de romanoj* (1979), *Ŝercoj, rakontoj* (1972, 2-a eld. 1974), *25 jaroj: antologio de Belartaj Konkursoj* (kun W. Auld; 1977), *La kato en la sako* (legolibro; 1978), *Baza literatura krestomatio* (1979, 3-a eld. 1986), *Hungara antologio* (1983), *Mi vizitis mian farmon* (antologio de E-literaturo en la hungara kaj E-o; 1987) kaj *Lingva arto* (jubilea libro por W. Auld kaj M. Boulton; 1999). Ekde 2001 Benczik estas membro de la Akademio de E-o.

Petr Chrdle (Ĉeĥio) naskiĝis en 1946. Li diplomiĝis kiel elektroteknika inĝeniero kaj doktoriĝis ĉe Instituto pri Elektroniko kaj Radiotekniko de la Ĉeĥoslovaka Akademio de la Sciencoj. Chrdle estis estrarano de Ĉeĥa E-Asocio 1987–2011, i.a. prezidanto 1987–1993, kaj fariĝis ĝia honora membro en 2008. Rajtigita ekzamenanto de UEA/ILEI, li verkis kun sia edzino *Stanislava* (1954–2000) la lernolibrojn *Esperantem za tři měsíce* (“Per E-o dum tri monatoj”; 1995, 3-a eld. 2006) kaj *Esperanto od A do Z* (“E-o de A ĝis Z”; 2016). Li verkis *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj* (1995; 3-a eld. 2013) kaj redaktis i.a. la prelegarojn *La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperan-*

to (1995) kaj *Intimaj temoj en la Esperanto-belletro* (2005). Docento de AIS, li oficis kiel ĝia senata sekretario 1990–1994. Li estis komitatano de UEA 1987–2010 kaj estrarano pri faka kaj scienca agadoj 1998–2001. En 1992 li fondis la kongresan kaj klerigan agentejon-eldonejon KA-VA-PECH, sub kies ŝildo li fariĝis unu el la plej gravaj nuntempaj E-eldonistoj. Li eldonis pli ol 170 titolojn, i.a. tri en la Serio “Oriento-Okcidento”, kaj eĉ pli grandan nombron por klientoj en- kaj eksterlande. Li organizis ankaŭ ses Konferencojn pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (KAEST; 1998–2008).

SO Gilsu (Korea Resp.) naskiĝis en 1944. Li doktoriĝis en 1979 kaj ekde tiu jaro estis profesoro pri ekonomiko en la Universitato *Sokyong* en Seulo. Li estis ankaŭ direktoro de la Korea Asocio pri Ekonomika Historio kaj prezidanto de la Instituto pri la Historio de Kogurjo. Li lernis E-on en 1966 kaj unue aktivis en la junulara movado, i.a. kiel prezidanto de Korea E-Junularo. Li estis sekciestro de ILEI en Koreio kaj vicprezidanto de Korea E-Asocio. En UEA li membriĝis en 1971 kaj estis komitatano kaj estrarano pri la azia agado kaj pri faka kaj scienca aplikado 1989–1995. Kiel estrarano li redaktis la bultenon Esperanto en Azio 1990–1993 kaj fondis la Komisionon pri Azia E-Movado en 1994. Li prelegis en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Varno (1978), Braziljo (1981), Budapeŝto (1983), Varsovio (1987) kaj Seulo (1994). Krome, en la 97-a UK en Seulo li estis rektoro de IKU. So aŭtoris la lernolibrojn *Kursolibro de Esperanto* (7-a eld. 1982) kaj *Praktiko de Esperanto* (1976, 2-a eld. 1981). Li instruis E-on i.a. en pluraj koreaj universitatoj, en la Nord-Amerika Somera Kursaro en San-Francisko kaj en Aŭstralio. En lia traduko aperis en 1983 la libroj *La sindonema arbo* kaj *Mi serĉas mian perditan...* de *Shel Silverstein*.

[GK 626 de UEA]

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj

Branĉo Poezio

Unua premio al *Antonio Valén*, Hispanio pro "Paralele"

Dua premio al *Benoît Philippe*, Germanio pro "Mathias"

Tria premio al *Aleksandro Mitin*, Rusio pro "Agemaj homoj kuras al sukceso"

Honora mencio al *Valentin Melnikov*, Rusio pro "Ironiaj hajkoj"

Juĝkomisiono: *Anja Karkiainen, Gerrit Berveiling, Giulio Cappa*

Partoprenis 39 verkoj de 18 aŭtoroj el 15 landoj

Branĉo Prozo

Unua premio al *Jesper Lykke Jacobsen*, Francio pro "La paradiza turo"

Dua premio al *Lenke Szász-Praid*, Rumanio pro "La heliko kaj la lacerto"

Tria premio al *Ewa Grochowska*, Francio pro "Malbenitaj skaraboj" kaj *Amir Naor*, Israelo pro "Anĝela"

Honora mencio al *Steven D. Brewer*, Usono pro "Krepusko sub fago"

Juĝkomisiono: *Jak Le Puil, Eliza Kehlet, Tim Westover*

Partoprenis 25 verkoj de 18 aŭtoroj el 12 landoj

Teatraĵo

Unua premio ne aljuĝita

Dua premio al *Amir Naor*, Israelo, pro "La situacio"

Tria premio ne aljuĝita

Honora mencio al *Raffaele del Re*, Italio pro "Teleskopoj ne funkcias"

Juĝkomisiono: *Wera Blanke, Paul Gubbins, Giuliano Turone*

Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj

Branĉo Eseo

Unua premio – premio Luigi Minnaja - al *Rafael Henrique Zerbeto*, Brazilo pro "La influo de Esperanto en la verkaro de Joao Guimaraes Rosa"

Dua premio al *Jorge Camacho Cordón*, Hispanio pro "La vartisto de vortoj"

Tria premio al *Jesus Moinhos Pardavila*, Galegio pro "La arkitekturo de deziro en la verkoj de Tarkony"

Honora mencio al *Jesus Moinhos Pardavila*, Galegio pro "Poŝtkarto el la genra tranĉeo: kio okazis al niaj verkistinoj?"

Juĝkomisiono: *Detlev Blanke, Gotoo Hitoshi, Giridhar Rao*

Partoprenis 7 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj


Infanlibro de la jaro

Eldonejo Bjelovara E-Societo pro "La trajno en la neĝo"

Juĝkomisiono: *Edmund Grimley Evans, Kitagawa Hisasi, James Rezende Piton*

Partoprenis 4 verkoj de 4 eldonejoj el 4 landoj

[GK 629 de UEA]



Estis du amikoj. Unu estis granda mensoganto, la alia kredis (almenaŭ ŝajnis). Foje la mensogulo diris: "Hodiaŭ mi vidis, ke bovino grimpis sur arbon." La kredemulo respondis: "Ja ĝi ungojn havas." La alia: "Ĉu vi vere estas tiel stulta, ke vi kredas tiaĵon!?" La simplulo pripensis, respondis: "Ja ne estus eble. La branĉoj rompiĝus sub la peza bovino."



Grupfoto. Fotoj: Katriina Muurainen-Särkkä.

Somera kurso en Iisalmi 14.–17.7.2016

La vetera prognozo por la kurso ne estis tre bona, sed la prognozo kiu temas pri la etoso estis des pli promesa, ĉar ni jam konis niajn instruistinojn, Gražina el Litovio kaj Tiina, kiu krome estis kursorespondeculo kaj kiel ĉiam bone prizorgis multajn aferojn. Onni, la kursestro, konsentigis sian tutan familion kunlabori, kaj ili ĉiuj helpis fari la kurson neforgesebla: la fratino de Onni, *Sirkka*, kuiris bongustajn manĝaĵojn por ni, ŝia edzo helpis transporti nin kaj la frato de Onni, *Kari*, hejtadis la saŭnon kaj bankuvegon por ni.

Ni havis kvar komencantojn kaj ok daŭrigantojn en la kurso. Unu hundo ŝanĝis la grupojn laŭ impulso, kiam ĝi iris de la mastriĉo al la mastro por flari aliajn gekursanojn kaj ricevi karesojn. Niaj instruistinoj laboris kun ambaŭ grupoj laŭvice, kio plaĉis al mi. – Ĉifoje ni ne havis eksterlandajn lernantojn proprasence de la vorto, ĉar *Lotti* kaj *Arpád*, kiuj origine

venis el Slovakio, jam vivis multajn jarojn en Finnlando. Sed ilia ĉeestado tamen ebligis interkulturan interŝanĝon, kaj ni povis lerni pri la lando, kie la UK komenciĝis semajnon poste. Estis tre interese babili kun ili.

Ni antaŭvidis la viziton de la ĵurnalisto el *Iisalmi Sanomat* jaŭde matene kaj pripensis, kiajn demandojn li eble havos. Vendrede du tutaj apudaj paĝoj de la gazeto rakontis pri Esperanto kun pluraj bildoj, kaj la foto de Tiina estis sur la unua paĝo. – Pli poste ni preparolis pri urboj, kiuj plaĉas al ni, priskribis bestojn, kiujn aliaj devis diveni, penis solvi enigmojn – tre malfacilajn – kaj skribis hajkojn. Por mi estis tre utile paroli kaj revivigi miajn lingvosciojn antaŭ la UK.

Posttagmeze ni vizitis la lokan entreprenon *Genelec*, kiu produktas laŭtparolilojn. Antaŭe mi pensis, ke mi ne multe komprenas pri tia tekniko, sed nia gvidisto prezentis ĉion tiel, ke

ankaŭ laikoj bone povis sekvi lin, kaj multaj demandoj vekigis. Ni ankaŭ aŭdis, ke antaŭ kelkaj jaroj *Madonna* en Londono nepre volis aĉeti blankajn laŭparolilojn de Genelec por sia tiama edzo, kio estas certa garantio de alta kvalito de tiu ĉi finnlanda produkto. Ne vane ĝia nomo havas la etimon "genius electronics". – Ni ankaŭ vizitis la akvoturon de Iisalmi, de kies tegmento oni havas bonan rigardon super la urbon.

Vendrede ni ekveturis al *Vesanto*, sed haltis en *Pielavesi* por rigardi la naskiĝdomon de nia longedaŭra prezidento *Urho Kekkonen*; agrabla surprizo! En *Vesanto* ni ekskursis al la salikobieno de *Kimmo Hakala*, vidis diversajn salikojn, aliajn arbojn, belajn salikaĵojn kaj ankaŭ multajn enigmajn ludilojn de *Kimmo*. Li kaj *Hillevi* regalis nin abunde.



Daŭrigantoj-progresantoj

Kiam ni estis ĝuintaj la belecon kaj pacon de la finnlanda kamparo, aliloke en la mondo okazis teruraĵoj: ni aŭdis pri la terura atako en Nico vendrede kaj pri la puĉo en Turkio sabate, kiam ni diskutis tiu-rilatan vortaron.

La kvin someraj kursoj, kiujn mi partoprenis, estis ĉiufoje unu el la kulminoj de mia somero. Ŝajnas al mi, ke la kursoj pliboniĝas de jaro al jaro. Ankaŭ la vetero nun estis pli bona ol la prognozo, kaj ni eĉ havis unu lecionon sur la korto de nia kursejo en sunbrilo.

Elkore mi dankas niajn karajn instruistinojn *Tiina*, kiu kiel kursospondeculo ĉiam klare informis nin pri detaloj (kio, kie kaj kiam), kaj *Gražina*, kiu ĉiam havis novajn bonajn ideojn kaj kiu neniam laciĝis respondi miajn multajn demandojn. Ili kune kapablis krei etoson, kie ni kuraĝis serĉi vortojn kaj ne timis erarojn. Korajn dankojn ankoraŭ al *Onni* kaj lia tuta familio. Sen ili ni ne estus havintaj tiun-ĉi eblecon pasigi kelkajn belajn tagojn en la kamparo. Dankojn ankaŭ al *Lotti* kaj *Arpád*, kiuj multfoje preparis kafon, teon kaj pli, kaj purigis poste.

Somer-memoroj
en januara frosto
varm' en la koro.

Leena Lindqvist, Kuopio



La kursanoj dum ekskurso en Syvälähti. Fotis *Kimmo Hakala*.

Semajno en Iisalmi, spertoj de nia instruisto Gražina



Gražina kaj Onni en grandbovinejo. Fotis Tiina Oittinen

Post la kurso en Orivesi, antaŭ du jaroj, mi gastis kelkajn tagojn en la bieno de Onni Kauppinen kaj al mi ege plaĉis tie ĉio: lago, ekskursoj, familio de Arpad kaj Lotti, saŭnoj, familianoj de Onni, bovinoj kaj hundoj, bicikloj kaj dancado... do mi decidis, ke mi revenos post du jaroj por plu ĝui la vivon en la bieno. Onni ne kontraŭis, nur demandis: *Se vi jam venos, ĉu vi ankaŭ povus instrui?*

Tiel okazis, ke en tiu ĉi somero, la 13-an – 17-an de julio mi revenis al Finnlando kaj Onni kun Tiina zorgis, ke kurso okazu.

La kurso estis en agrabla loka kultura centro, en natura angulo kun bela pejzaĝo. Ni estis malgranda grupeto, iom pli ol dek personoj, sed komencantoj estis nur kelkaj. Ni kun Tiina alterne gvidis la kurson antaŭtagmeze, sed postagmezoj estis kiel daŭrigo de la kurso – dum ekskursoj ni klopodis uzi Esperanton.

Ni havis kelkajn interesajn ekskursojn dum tiuj tagoj: ni ne nur konatiĝis kun la vidindaĵoj de Iisalmi, sed ankaŭ vizitis la fabrikon de la

laŭtparoliloj *Genelec*, ĝuis la postagmezon en la salikbieno de Kimmo kaj Hillevi en Vesanto, tre agrablan vesperon pasigis en la bieno *Tiikkala* kaj eĉ tuj post la kurso ni kun Onni kaj Tiina sukcesis vidi tre modernan bovinan farmon en la komunumo *Kiuruvesi*.

Kompreneble, saŭnumado estis ĉiutaga afero kaj tio estis ege bone, ĉar la vetero estis varia: ofte pluvetis kaj eĉ pluvis, la suno ankaŭ refoje aperis, sed vesperaj saŭnumadoj ĉiam varmigis kaj koron kaj korpon.

Kiel ĉiuj eksterlandanoj mi admiras la dancemon de finnoj kaj vere ĝuis du vesperojn en dancejo. Tio estas unu el la plej fortaj impresoj, kvankam mi jam spertis tion antaŭ du jaroj. Kio nun vere multe impresis min estis la helpemo kaj sincereco de familianoj kaj amikoj de Onni. Kaj fratino Sirka kaj la fratoj Kari kaj Seppo, kaj Raimo, kaj Arpad kun Lotti faris por ni multon: kuiris, zorgis pri nia komforto en la kursejo, veturigis nin k.t.p. Ke Onni kaj Tiina bone ĉion planis kaj antaŭvidis ne mirigas min, ĉar mi jam certis pri iliaj kapabloj, kvankam min kortuŝis kiam mia kursano-komencanto konfesis: mi venis al la kurso, ĉar Onni sendis al mi pli ol dudek telefonaj tekstmesaĝoj kun la invitoj-informoj...

Ĉu io mankis? Por mi mankis kelkaj aferetoj: tempo por pli ofte veni al la bovinejo kaj droloti bovinajn, mankis kuraĝo naĝi en *Nerko*, ja la vetero ne estis tre alloga (sed kelkaj finnoj naĝis) kaj mankis esperantistoj de la loka Iisalmi-klubo kun kiuj mi konatiĝis antaŭ du jaroj.

Mi esperas, ke nun ili ĉiuj, same kiel ĉiuj kursanoj de *Esperanto*, nature fartas bone kaj ke la kursanoj gardas belajn rememorojn. Mi volas kore danki al miaj karaj kursanoj, kiuj jam iĝis amikoj, al multaj helpantoj kaj ĉefe al la motoroj de nia somerkurso – Onni kaj Tiina – pro bela semajno de mia vivo!

Gražina

Turku informas: EST-aranĝoj nun aŭtune

Ĉe Esperanto-societo en Turku la aŭtuno komenciĝis en kutimaj formoj: kursoj en Aurala kaj renkontiĝoj en la biblioteka kafejo. Dum la somero ni ricevis kelkajn gastojn kaj eksterlande kaj enlande. Post la Aŭtunaj Tagoj nin vizitis *Anna Striganova* kaj *Dima Ševĉenko*, al kies turneo en Finnlando apartenas ankaŭ prelego de Anna en Aurala la 27-an de septembro.

Marde en Civitana Instituto de Aurala okazas Esperantokursoj por progresantoj kaj elementanoj kaj merkrede ni havos la renkonton en la kafejo Sirius de la ĉefbiblioteko. Oktobre aŭ novembre ni aj esperantlingvaj ĉiĉeronoj gvidos nin en la arta muzeo de Turku kaj rakontos pri la ekzpocizoj de la fama pentristino *Helene Schjerfbeck*. En decembro okazos la tradicia jula festeto. Gastoj estas bonvenaj en ĉiuj aranĝoj kaj nature ĉiam ajn. Informiĝu pri datoj kaj horoj ĉe EST-anoj, kontaktuloj:

Tiina Oittinen, (*tiina.oittinen@pp.inet.fi*, tel. 050-5494709) kaj Leena Tiusanen (*leena.tiusanen@elisamet.fi*, tel. 050 5757956).

Turun Esperanto-yhdistyksen syksy on käynnistynyt tavalliseen tapaan: esperantokursit alkajille ja jatkaville ovat tiistaisin Auralan kansalaisopistossa. Syyskuun viimeisenä tiistaina Auralassa on esperantokielineen esitys kansansaduista ja se tulkitaan suomeksi. Keskiyökköisin tapaamme Turun kaupunginkirjaston kahvila Siriuksessa. Loka-marraskuussa vieraillemme Turun taidemuseossa, jossa Leena ja Tiina kertovat esperantoksi Helene Schjerfbeck -näyttelystä. Pikkujoulut ovat perinteiseen tapaan joulukuussa. Vieraat ovat tervetulleita kaikkiin tilaisuuksiin ja toki muulloinkin.

Kerro tulostasi ja varmista tapaamisajat, yhteyshenkilöt ovat:

Leena Tiusanen, leena.tiusanen@elisamet.fi, puh. 050-5757956 ja Tiina Oittinen, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai puh. 050 5494709.

Respondecoj de la estraranoj de UEA

La Estraro de la Universala Esperanto-Asocio decidis pri la laborkampoj de siaj membroj:

Mark Fettes (Prezidanto): Strategio, Kunordigo, Statuta Reformo, Esploro kaj Dokumentado, Faka kaj Scienca Agado;

Stefan MacGill (Vicprezidanto): Instruado, Jaro de la Lernanto, Meza Oriento kaj Norda Afriko, Rilatoj kun Membro-Organizoj kaj Ĝemelaj Urboj;

Martin Schäffer (Ĝenerala Sekretario): Fi-

nancoj, Administrado, Retejoj kaj Retlistoj, Ameriko;

Emilio Cid: Informado, Amikoj de Esperanto kaj Zamenhof-Jaro;

Lee Jungkee: Azio, Afriko kaj Esperanto-Centroj;

Sara Spanò: Eksteraj Rilatoj, Aktivula Maturigo, Eŭropo, Terminologio, Kulturo kaj Kongresoj.

GK 631

La 49-a konferenco de ILEI



Deklivoj en Tokaj. Fotis Sylvia Hämäläinen

La konferenco okazis 30.7.–6.8.2016 en *Nyíregyháza* en nordorienta Hungario. Ĝi estis la lasta konferenco de ILEI. Ne, ILEI ne finis sian aktivadon. La sekva renkontiĝo nomiĝas La 50-a kongreso de ILEI. Tiu ŝanĝo estis unu el la decidoj de la komitato. En la malfermo estis anoncita, ke en la UK en Nitra la prezidanto de ILEI, *Mireille Grosjean* (Mirejo), ricevis la premion *Deguĉi*, kiu estas ”la Nobel-premio de Esperanto”.

Ĉi-jare kolektiĝis 120 personoj, eĉ 16 el la malproksima Koreio, la sekva kongreslando. Bedaŭrinde ses personoj el Afriko ne ricevis vizon. La konferenco okazis en la universitataj konstruaĵoj kaj la hotelo situis samloke. Du dultitaj ĉambroj havis komunajn necesejon kaj duŝejon kaj ambaŭ propran klimatizilon, kiu tamen ne ĉiam funkciis. La tutan semajnon regis varmego de pli proksime al 30° ol 25°. Pro la varmego, kaj riĉa programaro, mi nur unufoje promenis en la urbo.

La komitato (la parlamento) kunsidis trifoje entute dum 11 horoj. Krom la ordinaraj jarkunsidaj aferlistaj punktoj kaj la nomŝanĝo de la somera okazo de ILEI, ni decidis pri la ebleco abonati retan version de nia ”juvelo” *Juna amiko*, elektis doktorinon *Ilona Koutny* kiel honoran membron de la Ligo kaj akceptis du novajn sek-

ciojn, tiujn de Tanzanio kaj Barato. Nun ILEI havas sektion en 41 landoj.

Samtempe kun la komitataj kunsidoj okazis pluraj diversaj kursoj aŭ prezentoj, ekzemple instruado de la hungara lingvo, kiun mi volis partopreni, sed ne povis. Okazis kurso por




Sylvia en ĉokoladfabriko.

komencantoj (kun atestilo), okazis instruista trejnado (kun atestilo pri partopreno) kaj okazis simpozio kun prelegoj rilate al instruado kaj lernado. Vespere ni vidis plurajn hungarajn grupojn danci, muziki aŭ kanti. Multaj konferencanoj montris siajn talentojn al ni aliaj en la internacia vespero.

Jam la tradicia lingva festivalo okazis en la etnovilaĝa muzeo en la parko *Sóstó* en la konferenca urbo.

La buso de la tuttaga ekskurso ĉiam haltis ĉe iu speciala loko en la departemento, kies ĉefurbo Nyíregyháza estas. Ni vidis la belajn deklivojn de *Tokaj* kun longaj vicoj de vinberujoj. Kompreneble okazis vingustumado. En *Mad* ni vizitis barokstilan sinagogon el la fruaj jaroj de la 1800-aj jaroj. *Abaujzántó* estas urbo, kie naskiĝis la elstara esperanta poeto D-ro *Kolomano Kalocsay*. Ni vizitis la muzeoĉambron, kie s-ino *Adri Pásztor* prezentis liajn vivon kaj verkojn. Poste ni promenis al la busto pri li kaj strateto nomita laŭ li kun ŝildo sur muro. La plej dolĉa loko estis ĉokoladfabriko en *Szerencs*. Aŭskultante la prezenton pri ĉokoladaj dolĉaĵoj ekde la frukto kaj semoj de kakaoarbo ĝis preta produkto ni rajtis manĝi tiom multajn ĉokoladpecojn kiom ni



Lingvofestivala programo.

volis. Poste ĉiu vojaĝanto vestis sin en blanka ŝirmanta supervesto kaj ĉapeleto kaj preparis du ĉokoladplatojn. Tiuj estis metitaj en fridujon, tiel ke ni ricevis ilin antaŭ ol foriri.

La prezidanto de la venontjara LKK invitis esperantistojn el la okcidentaj landoj veturi al *Busan* en Koreio al la 50-a Kongreso de ILEI antaŭ la UK por montri al la lokaj loĝantoj, ke Esperanto vere estas internacia lingvo.

Rememoris

Sylvia Hämäläinen

Ba ba dum – nyt myös esperantoksi

Aperis esperanta versio de *Ba ba dum* (www.babadum.com). Temas pri kolekto de 1.500 vortoj en 20 lingvoj, kie oni povas lude lerni la vortojn kaj konkuri inter la internacia partoprenantaro.

Ba ba dum funkcias perrete en foliujmilo, kaj ekzistas kelkaj manieroj elekti aŭ kunmeti la vortojn kun laŭtlegado.

Komencantoj kaj lingvoŝatantoj same povas ĝui la tempopasigilon.

Ba ba dum on hauska sananopiskelupeli, joka on nyt ilmestynyt myös esperantoksi. Se sisältää 1 500 sanaa 20 kielellä, ja toimii nettiselaimella osoitteessa www.babadum.com.

Pelissä on eri vaihtoehtoja sanojen valintaan ja muodostamiseen. Mukana on myös malliääntämys. Kansainvälisen osallistujakunnan kanssa voi kilpailla rekisteröitymisen jälkeen. Joka tapauksessa Ba ba dum on hauska ajanviete sekä aloittelijoille että muille kielten ystäville.



Manifestacio en la urbocentro. Fotoj: RB.



LLZ ĉeestis

Kongresumado laborante

Dum la Universala Kongreso en Nitro, la duan fojon en mia vivo mi redaktis la ĉiutagan kongresan kurieron. La unua fojo estis en 1995 en Tampere. Ĉar mankis slovakaj esperantistoj, ili petis jam pasintjare min por tiu laboro por kio ne necesis koni la lokan lingvon aŭ lokon mem. La laboro estis principe postulema, ĉar ĉiumatene (krom merkrede) devis esti preta kaj presita kvarpaĝa gazeto. La presado ne estis problemo, tion prizorgis la presejo en la sama konstruaĵo kie la kongreso okazis. Feliĉe mi havis ankaŭ kunlaboranton *Edoardo Nannotti* el Italio kiu engaĝigis la gazeton.

Kiel mi antaŭtimis, la unuaj du numeroj estis la plej problemaj, kaj eĉ pli problemaj ol mi pensis, ĉar mi antaŭvidis multon da novaj aliĝoj, kiuj facile plenigus unu paĝon el ambaŭ numeroj, sed fakte estis nur malmultaj kiuj lastmomente aŭ surloke aliĝis. Tamen la numeroj sukcesis. Kiam ni finis la duan je la deka vespere venis gardistoj de la kongresejo kaj forpelis nin el la konstruaĵo. Feliĉe la

aferoj estis tiom pretaj ke necesis nur ke la engaĝigisto povis labori en sia hotelo kaj mi poste tra interreto ricevis la materialon kaj povis akcepti ĝin por presado. Poste ni ricevis permeson resti en la kongresejo eĉ pli malfrue, sed feliĉe tio ne estis bezonata dum aliaj tagoj de la semajno.

Dum la postaj tagoj kontribuajoj de kongresanoj plenigis relative facile la paĝojn. Tamen mi ne povis partopreni multe al la vesperaj programeroj, ĉar la laboro estis farita plejparte vespere.

La kongresurbo estis malgranda kaj ĉio atingeblis piede facile. Kaj ĉie videblis esperantistoj: vespere revenante al hotelo, konatuloj el surstrataj drinkejoj ofte salutis kaj petis min kundrinki. La kongresejo estis la agrikultura universitato de Slovakio, sed pli grandaj eventoj devis okazi aliloke, en sporta halo, en la ĉefa urba placo aŭ en la urba teatro. Esperanto tre multe videblis en la urbo. La kongreso estis pli malfermita por la loka publiko ol eble iam antaŭe, sed restis por mi neklara ĉu la publiko

vere venis al lingvokursetoj, kiuj okazis en la kongresejo mem.

Programoj estis plejparte kutimaj, sed estis io neordinara. Unu el la plej interesaj kaj utilaj programeroj estis prelego, kiel pli efike lerni fremdajn lingvojn. Pro spacomanko en la salono necesis ripeti la prelegon en alia tago kaj tial ankaŭ mi sukcesis kapti ĝin. Multaj esperantistoj ja estas lingvolernantoj kaj jen estis unu el vere utilaj prelegoj kun multe da praktikaj sugestoj. La preleganto scipovis dekon da lingvoj, inter ili la tre proksimajn slovaka, ĉeĥa kaj pola, kaj ŝi ankaŭ profesie agis kiel lingvoinstruisto en universitato. Ne mirinde, ke inter ŝiaj lingvoj estis ankaŭ Esperanto (kaj ankaŭ la slovaka gestolingvo).

Jukka Pietiläinen



Nova Esperanto-arbo antaŭ la kongresejo

Sukcesa medicinista konferenco en Nitra

La 20-a Internacia Medicina Esperanto Konferenco (IMEK) okazis dum tri tagoj en la urba hospitalo de Nitra tuj antaŭ la 101-a UK. Dank al la malavara kunlaboro de la hospitalo la partoprenantoj povis uzi la prelegejon de la hospitalo kaj ĝui pri senpagaj matenaj manĝaĵoj antaŭ la prelegejo kaj pri senpagaj tagmanĝoj en la manĝejo de la hospitalo. Do, pro la gastamaj gekolegoj en la hospitalo la konferenca kotizo estis nur 25 eŭroj.

La temo de la konferenco estis ”Medicinistoj kaj tutmondiĝo – kiajn medicinistojn bezonas la nuna jarcento?”. Partoprenantoj estis entute 33 el 11 landoj (Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Germanio, Hungario, Kroatio, Pollando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio kaj Hinda Unio). Oficialaj lingvoj de la konferenco estis Esperanto kaj la slovaka. Ni aŭdis 14 prelegojn en Esperanto kaj 5 prelegojn en la slovaka. Ĉiuj prelegoj estis tradukitaj el Esperanto al la Slovaka kaj inverse danke al la majstraj junaj esperantistoj *Marek Blahuš* kaj *Marteno Miniĥ*.

Reprezentantoj de la hospitalo prelegis ekz. pri onkologiaj terapioj de metastaza rena kancero, cerbaj hemoragioj kaj pri novaj mikroboj kaŭzantaj novajn infektojn. Prelegoj de esperantistaj medicinistoj traktis ekz. haŭtajn malsanojn kaŭzantajn de sunlumo, la ĵuron de Hipokrato en la nuna tempo, ostoporozon kaj dormo-apneon. Oni prezentis al ni ankaŭ la flegoroboton ”Zora”, kiun oni jam komencis testi ekz. en Finnlando en la prizorgado de gemaljunuloj.

La medicinista konferenco kaptis ankaŭ la atenton de amaskomunikiloj: Radio kaj televideo intervjuis partoprenantojn kaj raportis pri la konferenco. Ni do ne povis prezenti nur al la gekolegoj utilecon kaj taŭgecon de Esperanto en internacia medicino, sed ankaŭ al la vasta amaskomunikila publiko. Malgraŭ la sufiĉe malgranda nombro de partoprenantoj, mi povas diri, ke la konferenco estis granda sukceso.

Arja Kuhanen

Rajdi mortan ĉevalon

Saĝaĵo atribuita al dakota-indianoj tekstas

”Se vi konstatas, ke vi rajdas mortan ĉevalon, deseliĝu.”

Moderna administrado tamen trovas pliajn manierojn trakti la problemon:

- Ni havigu pli fortan vipon.
- Ni ŝanĝu la rajdanton.
- Ni diras ”Tiel ni ĉiam rajdis la ĉevalon.”
- Ni kreas laborgrupon por analizi la ĉevalon.
- Ni vizitas aliajn lokojn por kompari, kiel oni tie rajdas mortajn ĉevalojn.
- Ni altigas la kvalitstandardon pri rajdado de mortaj ĉevaloj.
- Ni kreas laborgrupon por revivigi la mortan ĉevalon.
- Ni enŝovas trejnseesion por lerni rajdi pli bone.
- Ni komparas diversajn mortajn ĉevalojn.
- Ni ŝanĝas la kriteriojn, kiam ĉevalo estas rigardata morta.
- Ni dungas eksterajn fakulojn por rajdi la mortan ĉevalon.
- Ni jungas plurajn mortajn ĉevalojn por rapidigi ilin.
- Ni deklaras: ”Neniu ĉevalo povas esti tro morta por tamen motiviĝi.”
- Ni liberigas aldonajn risursojn por altigi la povon de la ĉevalo.
- Ni studas, ĉu haveblas malpli kostaj konsilantoj.
- Ni deklaras, ke nia ĉevalo estas ”pli bone, rapide kaj malpli koste” morta.
- Ni kreas kvalitrondon por trovi uzeblojn por mortaj ĉevaloj.
- Ni instalas sendependan postenon por mortaj ĉevaloj.
- Ni vizitas kostajn seminariojn por ekscii pri vivcirkonstancoj de mortaj ĉevaloj.
- Ni dungas eksteran konsiliston, kiu deklaras, ke ni devas maldungi personaron por galopigi la mortan ĉevalon.
- Ni eksterumas la mortan ĉevalon. Subentreprenisto verŝajne pli bone kapablas rajdi ĝin.
- Ni kreas Powerpoint-foliojn por montri, kion la ĉevalo kapablas, se ĝi vivus.
- Ni deklaras, ke morta ĉevalo estis dekomence nia celo.
- Ni metas la mortan ĉevalon en alies stalon kaj asertas, ke ĝi apartenas al tiu.
- Ni kreas novan sekcion kaj integrigas ĉiujn mortajn ĉevalojn por utiligi sinergiojn.
- Ni kontestas, ke ni iam ajn posedis ĉevalon.
- Ni ŝanĝas la liveranton de la ĉevalo.
- Ni serĉas financfortan partneron kaj fondas komunan firmaon.
- Ni ĵetas la mortan ĉevalon sub fantaziplena nomo sur la borson.
- Ni nomas la mortan ĉevalon ”Dead Horse Power” kaj ofertas ĝin kiel plej freŝan varon en la afrika merkato.
- Ni interŝanĝas la mortan ĉevalon kontraŭ alia morta ĉevalo, kiu laŭ prognozoj kuras pli rapide.
- Ni renovigas la stalon.
- Ni proponas al la personarkonsilio enkonduki instigojn por mortaj ĉevaloj.
- Ni komencas internan idekonkurson pri la rajdado de mortaj ĉevaloj.
- Ni instrukcias la rajdanton atendi ĝis la ĉevalo ree ekstaras.
- Ni prilaboras la instrukciojn pri la rajdado de mortaj ĉevaloj.

*RB,
laŭ retaj fontoj*

Kansainvälistä oppilasvaihtoa Kaarinassa 50 vuotta sitten

Pohjanmaalta on peräisin sanonta ”vekkuliteheras sano Viitala kansakoulua”. Uno Cygnaeuksen ajoista lähtien on koululaitoksessemme seurattu tarkasti ajan virtauksia. Näin toimitaan yhä edelleen. Lukuvuonna 1959–1960 alkoi Kaarinan Rauvolan kansakoulussa vieraan kielen opetus. Opetussuunnitelmaan liitettiin kansainvälinen kieli esperanto vapaaehtoisena aineena. Oppilaille osallistuminen oli pakollista. Yleistä valtakunnallista vieraan kielen opetusta kansakoulussa ei tuolloin vielä ollut. Käsite globaalinen maailma ei ollut saanut sijansa ihmisten mielissä. Kansainvälisiin yhteyksiin pyrittiin jo silloinkin monin eri tavoin.

Rauvolassa käynnistettiin toiminta näyttävän monipuolisesti. Jo heti syyskuussa saapui vieraaksi maantieteilijä Tibor Sekelj Beogradista kertomaan tutkimusmatkoistaan Etelä-Amerikassa. Häntä seurasi japanilainen pääsihteeri Eizo Ito, joka avasi oppilaille äidinkieliensä salaisuuksia. Vierailut jatkuivat tasaiseen tahtiin. Hyvin kiinnostava oli tanskalaisen opettajan Mogens Rude Andersenin viikon vierailu lokakuussa 1963. Jo edellisellä vuonna kymmenen koulun oppilasta osallistui lasten kansainväliseen kongressiin Kööpenhaminassa.

YK julisti vuoden 1965 kansainvälisen yhteytyksen vuodeksi. Näissä merkeissä saapui keväällä Puolasta kaksi koulutyttyä Bojena ja Danuta opettajansa Stefania Palican kanssa vierailulle Rauvolan kouluun. Tytöt puhuivat sujuvasti esperantoa, sillä se oli heidän toinen kotikielensä. Oppilaat saivat konkreettisesti kosketuksen kansainvälisyyteen. Neljätois-

ta sanoma- ja aikakausilehteä selosti vierailua. Olihan kyseessä harvinainen kansainvälinen kohtaaminen kansakoulussa. Seuraavana vuonna 1966 kuudesluokkalainen Usko Heinonen viipyi lähes pari viikkoa Szczecin-nimisessä satamakaupungissa. Hän oli kahdessa vuodessa saavuttanut erittäin sujuvan arkikielen puhetaidon. Suurissakin kouluissa hän luontevan vapaasti esiintyi oppilasjoukon edessä.

Jatkuva vierailevien opettajien ja muiden asiantuntijoiden virta Rauvolan koulussa kannusti oppilaita kielenopiskelussa. Monilla oli kirjeenvaihtoveri ulkomailla. Tässä asiassa erikoisen taitavia olivat Ritva Plump ja Aila Huunonen. Sveitsissä toimitettiin koululaislehteä Grajnoj en Vento (Jyviä Tuulessa). Lehdi levisi kaikkiiin maanosiin ja ilmestyi neljä kertaa vuodessa. Mukana toimitustyössä olivat myös Rauvolan kansakoulun oppilaat.

Syksyllä 2016 otetaan kouluissa käyttöön uudet opetussuunnitelmat. Niissä korostuu oppilaiden itsenäisen tiedonhankinnan periaate. Samoilla jalanjäljillä oltiin Kaarinassa jo viisi vuosikymmentä sitten, kun luotiin kansainvälisen oppilasvaihdon yhteyksiä. Siinä ei unohdettu koululaisten omiakaan kontakteja. On tapana sanoa, että ajat muuttuvat ja me niiden mukana. Aina jotain pysyvää ja kestäväkkin näyttää kuitenkin seuraavan opintiellä kulkevien mukana vuodesta toiseen.

*Jorma Ahomäki
kaarinalainen ”vekkulitehtailija”
1957–1990*

Forpasis du membroj de Antaŭen



Marjatta Joki

Nia dumviva membro *Marjatta Joki* forpasis en julio atinginte la aĝon de 91 jaroj. Ŝi loĝis jam plurajn jarojn en *Tammenlehväkoti*, hejmo por militveteranoj. Ŝi ankoraŭ partoprenis la 90-jariĝan feston de Antaŭen en 2011. Ŝi partoprenis kelkajn UK-ojn kaj studis en la pensiula grupo de Antaŭen.



Lauri Liukkonen

Lauri pereis post multjara malsano en julio en la aĝo de 76 jaroj. Rememorante pos-

te nian kongreson en 1995 multaj eksterlandaj homoj precipe menciis la nomon de Lauri. Li gvidis la muzikon de la komuna kantado per sia akordiono. Grandan antaŭlaboron li faris kun *Pentti Järvinen* kolektante kaj aranĝante la kantojn en prespreta formo kun vortoj kaj melodioj. La libretoj estis disdonitaj en la kongresaj sakoj. Ĉiam ni havis agrablan muzikon en niaj kristnaskaj festetoj, sed bedaŭrinde ne plu en la lastaj jaroj.

Lauri estis multjara membro de la estraro kaj estis du jarojn la prezidanto de la societo. Li partoprenis multajn UK-ojn kaj aktive kontribuis ankaŭ en la 80-a UK en Tampere.

Forpasis Detlev Blanke (1941–2016)



Dr-ro *Detlev Blanke*, unu el la plej renomaj nuntempaj interlingvistoj, forpasis la 20-an de aŭgusto en Berlino. Li naskiĝis la 30-an de majo 1941. Blanke lernis Esperanton memstare en 1957. Li doktoriĝis en 1976 per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana (Plansprache und Nationalsprache), kaj akiris docentan diplomon en 1985 per disertacio pri planlingvoj (Internationale Plansprachen). En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina *Humboldt*-Universitato, kie li daŭre prelegis ĝis 2007.

Blanke estis sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko 1968–1980 kaj ekde 1981 de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, kiu en 1991 unuiĝis kun Germana Esperanto-Asocio. Kiel sekretario li ankaŭ redaktis la re-

vuon *der esperantist*. De 1974 li estis estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kies bultenon *Informilo por Interlingvistoj* li redaktis ekde 1992. De 1992 ĝis 2013 li kompilis (kun *H. Tonkin*) bibliografion pri Esperanto kaj interlingvistiko por la usona *Modern Language Association*.

Unu el la iniciatoj de Blanke estas la Esperantologiaj Konferencoj, okazantaj en ĉiu UK ekde 1978. Li organizis ĉ. 20 el ili kaj redaktis la aktojn de pluraj. En 1991 Blanke kunfondis *Gesellschaft für Interlinguistik* (Societo por Internacia Lingvo; GIL). Li estis ĝia prezidanto ĝis 2011 kaj redaktis ĝian bultenon kaj la aktojn de multaj GIL-konferencoj.

Blanke prelegis en multaj Esperantorenkontiĝoj, lingvistikaj konferencoj k.a. aranĝoj en multaj landoj. Li estis ege fekun-

da aŭtoro kaj redaktoro: la bibliografio de liaj publikaĵoj ampleksas pli ol 1200 unuojn. Kun sia edzino *Wera* li laboris i.a. pri terminologio kaj iniciatis la fondon de Terminologia Esperanto-Centro de UEA en 1987. Pro meritoj en la terminologia kampo ambaŭ estis premiitaj de Infoterm per la *Eugen-Wüster*-Medalo en 2006. Pro sia interlingvistika agado Blanke ricevis ankaŭ la estonan premion *Academicus*

Paul Ariste.

Detlev Blanke estis komitatano de UEA 1978–1998 kaj membro de diversaj komisionoj kaj laborgrupoj, i.a. kiel juĝanto pri eseoj por la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1980. Li estis ankaŭ membro de LKK de la 84-a UK en Berlino en 1999. En 2011 li estis elektita Honora Membro de UEA.

GK 632

Forpasis Reinhard Selten (1930–2016)



La 23-an de aŭgusto Esperantujo perdis sian plej eminentan scienciston per la forpaso de prof. d-ro *Reinhard Selten*, naskiĝinta la 5-an de oktobro 1930. En 1961 li doktoriĝis pri matematiko en la Goethe-Universitato de Frankfurto-ĉe-Majno, kie en 1968 li akiris docentan diplomon. En la studjaro 1967–1968 li estis gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en *Berkeley*. Li estis profesoro en la Libera Universitato de Berlino 1969–1972, en la Universitato de *Bielefeld* 1972–1984 kaj ekde 1984 en la Universitato de *Bonn*. De 2006 ĝis 2014 li gvidis esplorprojekton pri eksperimenta ekonomiko de la Nordrejn-Vestfalia Akademio de Sciencoj kaj Artoj. Dek unu universitatoj asignis al li honoran doktorecon.

En oktobro 1994 Selten fariĝis, kun du usonaj ekonomikistoj, laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia elstara kontribuo al la ludoteorio. Krom pri ludoteorio, Selten faris pioniran esploradon pri eksperimenta ekonomiko kaj pri limigita racieco. En lia ampleksa scienca bibliografio, ĉefe en la germana kaj angla, troviĝas ankaŭ la verko ”Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj” (1982; 2-a eld. 1995), kunaŭtorita kun *Jonathan Pool*.

En Frankfurto (ĉ. 1960) Selten ekzameniĝis kiel Esperanto-instruisto kaj estis vicprezidanto de la loka klubo. Li konatiĝis kun sia edzino pere de Esperanto kaj instruis la lingvon ankaŭ al sia pli juna frato. Li estis, same kiel la edzino, dumviva membro de UEA ekde 1969 kaj membris ankaŭ en Germana Esperanto-Asocio kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). En la 84-a UK en Berlino (1999) li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato.

Sub la redaktora nomo de Selten aperis la diverslingve eldonita studkolekto ”La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado” en 1997. Kun *Helmar Frank* li publikigis la libron ”Für Zweisprachigkeit in Europa” (Por dulingveco en Eŭropo, 2005). En la Eŭropa Parlamento Selten pledis por Esperanto kiel invitita parolanto la 9-an de majo 2007, okaze de la 50-jariĝo de la Roma Traktato. En la eŭropaj elektoj en 2009 li estis la ĉefkandidato de la germana sekcio de la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

En la 80-a UK en Tampere en 1995 Reinhard Selten estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

laŭ GK 634

HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO INTER LA BLINDULOJ 1888–2015

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)



Eldonis Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, 2016.
334 p. 50 fotoj. 25 cm. 20 €

Mendu ĉe:

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 HELSINKI,
ritva.sabelli@pp.inet.fi

” – neni povas kontesti, ke niaj kongresoj donis multajn konsilojn kaj impulsojn al gvidantoj de la blindulafero tiele, ke jam antaŭ 1939 estis metita la fundamento, sur kiu post la milito estis konstruata la moderna sociala blindulprizorgado nun aplikata preskaŭ en ĉiuj kulturaj landoj de nia tergloblo.” *Joseph Kreitz*

La tri unuaj volumoj pri la historio de la blindulesperantista movado aperis en brajlo 1972, 1981, 1990. Tiuj ĉi volumoj kovras la agadon ĝis 1939. Nun haveblas ĝisdatigita platskriba verko kun kvar volumoj.

Blinduloj kuraĝe partoprenis kune kun vidantaj amikoj en ĉiujaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto ekde la komenco de la dudeka jarcento. Esperanto estis la sola fremda lingvo instruata en blindullernejoj. Ekde de 1904 la aperanta revuo “Esperanta Ligilo” estis grava informilo kaj kontaktilo. Ĝi eĉ normigis la esperantan brajlon.

Ĉu vi sciis, ke oni povas atribui al Esperanto la meriton pri funkciigo de mond vasta kunlaboro inter blinduloj kaj blindulorganizaĵoj? Legu pli en la nova eldono de la historio.

”Imagu, jam antaŭ cent jaroj niaj pioniroj kreis per Esperanto internacian komunumon de viddifektitoj. Per la nova eldono de la historia verko ni respektas la laboron de niaj pioniroj.” *Arvo Karvinen*

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☐ onni.kauppinen@gmail.com
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 ☐ kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☐ www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaäin r.y. / Esperanto-societo Antaäin, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☐ www.esperanto.fi/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi) ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☐ sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☐ steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☐ bovoeo73@gmail.com.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2016

Nro	Limdato	Aperas
5/2016	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivua/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivua/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.

Tämän numeron ”kansikuvapoikana”

... on niin tunnettu persoona, ettei häntä tarvitse monille erikseen esitellä: paavi Franciscus. Italian esperantoliiton kongressi oli elokuun viimeisellä viikolla Frascatissa lähellä Roomaa (katso Sakari Kauppisen matkakertomusta ja kuvia sivulta 6). Yksi lähiseuturetki suuntautui Pietarinkirkon aukiolle, missä paavin viikottaisen vastaanoton puheen aihe oli järkyttävän ajankohtainen; Perugian maanjäristys oli juuri tapahtunut.

Paavi Franciscus toivoo uskontojen yhteistyötä, ekumeniaa. Se oli myös Ludwik Zamenhofin, Tohtori Esperanton, ajatus. Hänen

”Homaranismo” (ihmiskunnan jäsenyys) -ajattelunsa tähtäsi uskonnollisten niin kuin kansallistenkin raja-aitojen ylittämiseen. Tässäkin asiassa Zamenhof oli niin edellä omaa aikaansa, että esperanton ensimmäisen, Ranskan Boulogne-sur-Merissä 1905 pidetyn maailmankongressin järjestäjät pyysivät jättämään hänen juhlapuheeseensa kuuluvan päätösrunon kuuden, viimeisen säkeistön, liian radikaalina pois, ja siihen hän joutui suostumaan. Nyt, 111 vuotta myöhemmin, tämän säkeistön ohjelma on yhtä ajankohtainen.

tg

.....

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
al frata la celo ni iru obstine
antaŭen, senfine.

Liittykää yhteen, veljet, kädet käsiin,
eteenpäin rauhan aseini!
Kristityt, juutalaiset tai muhamettilaiset
me kaikki olemme jumalan lapsia.
Muistakaamme aina ihmiskunnan parasta,
ja huolimatta vaikeuksista, pysähtymättä,
veljeyteen suunnatkaamme sitkeästi
eteenpäin, lakkaamatta.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 15.11.2016 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2016 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.